# *Pensado de Fidel Castro centrigos fakan debaton*



Havano, okt 25  (RHK) Kubaj fakuloj debatos, ?i-mardon, en ?i tiu ?efurbo pri la historia gvidanto de la Revolucio, Fidel Castro, kaj lia efiko al internaciaj rilatoj, instruoj kaj kontribuoj al lia strategia pensado en tiu areo.

Partoprenas en la diskutrondo, okazonta en la Centro Fidel Castro, esploristoj de tiu institucio, Katiuska Blanco, Elier Ramírez kaj René González Barrios (direktoro), kaj anka? Hassan Pérez, de la Centro por Hemisferaj kaj Usonaj Studoj ?e la Universitato de La Havano.

Tiu ?i teoria renkonti?o okazos en la kunteksto de la sepa Konferenco pri Strategiaj Studoj, kiu de la 26-a ?is la 28-a havos kiel temon la Polusojn de potenco, multflankismo  kaj dilemoj de la transiro al nova internacia ordo.

La evento estas kunvokita de la Centro por Internacia Politiko-Esplorado (CIPI), kun la kunsponsado de la Latin-Amerika Konsilio de Sociaj Sciencoj (Clacso) kaj okazos sub hibrida formato.

Inter la ?efaj temoj estas “Geopolitiko, konfliktoj kaj redifino de aliancoj. Tutmondaj kaj regionaj efikoj", kaj "Kunordigo kaj proponoj de la Tutmonda Sudo. Plurflankeco sub debato en la transiro de la internacia ordo”.

Anka? estas inkluzivitaj "Temoj pri la tutmonda kaj regiona tagordo en kunteksto de transiro: migrado, ?uldo, klimata ?an?o, sano kaj teknologio" kaj "Ekstrema politika diskurso kaj manipulado de informoj. Infoksiki?o de ciferecaj platformoj”.

La debatoj estos elsenditaj en rekta en la jutuba kanalo CIPICuba, kaj la registradoj de la prezentoj kaj specialaj intervenoj estos publikigitaj per la retejo kaj instituciaj profiloj de la Centro, dum la skribitaj verkoj restos en cifereca formato.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/302882-pensado-de-fidel-castro-centrigos-fakan-debaton

**Radio Habana Cuba**